



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/0001-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA

Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA

Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

SET/OUT/1984

BOLETIM INFORMATIVO

Nº85

BKE-ESTRARO POR 1985/87

Malgraŭ la insistaj petoj de amikoj kaj kunestranaroj, kiuj deziras reelekti min kiel prezidanton de BKE por la jartrio 1985/87, mi rezignis la grandan honoron kaj decidis lanĉi la nomon de la nuna vicprezidanto, veterano Nelson Pereira de Souza, por anstataŭi min dum la venonta oficperiodo.

De post dek sinsekvaj jaroj de dorna laboro por nia Organizaĵo, sep kiel kasisto kaj tri kiel prezidanto kaj ĉefredaktoro de tiu ĉi-Bulteno; de post pli malpli kvar jaroj kiel peranto de UEA kaj ĝenerala kasisto por la 66-a Universa Kongreso de Esperanto; de post du jaroj kaj duono kiel kunordiganto de la Nacia Esperanto-Komisiono — NEK, mi supozas, ke mi rajtas ripozi iomete, for de kiu ajn respondeco, almenaŭ dum unu aŭ du jaroj.

Nelson Pereira de Souza, kunfondinto de nia Organizaĵo kaj de multaj aliaj institucioj esperantistaj, pro sia kapablo, dinamismo, sperto kaj bonaj rilatoj en diversaj medioj, estas sendube la persono ideala por komandi la destinon de BKE kaj kunordigi la evoluadon de NEK, institucioj kies administrajn strukturojn, internaciajn rilatojn, financajn situaciojn

kaj agadplanojn li konas profunde kaj detale.

Kvankam neniu alia kandidato sin prezentis por konkuri al la posteno kiun mi forlasos la 31-an de decembro, mi petas, ke ĉiu ano de BKE voĉdonu por la jena kaj sola nomaro registrita ĉe la subskribinto: Nelson Pereira de Souza (Prezidanto), Elvira Fontes (Vicprezidanto), Ludimar Azevedo da Silva (Sekretario), José Carlos Dorini Ramos (Kasisto) kaj D-ro Paulo Vieira da Silva (kulturaj Aferoj).

La balotado okazos en Florianópolis-SC (18-11-84 je la 9-a horo), kadre de la 3-a Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto, kiu havos kiel sidejon la Instituto Estadual de Educação (I.E.E.), Avenuo Mauro Ramos sen n-ro.

Kiu ne povos ĉeesti persone, bonvolu voĉdoni per letero, adresante la koncernan koverton jene: Asembleo de BKE, a/c Esperantista Asocio de Santa Catarina, Caixa Postal 460, BR 88000 — Florianópolis.

Tre koran dankon al ĉiuj!

Carlos A. Cunha
Prezidanto

PERIODAĴOJ RICEVITAJ

Trafis la redakcion jenaj publikigaĵoj, kies gentilan sendon ni tre dankas:

Espero katolika (Italio), Velo Bulteno (Jugoslavio), UN kaj NI (Nederlando), La Espero (Koreujo), Franca Esperantisto (Francujo), BEL-Informas (RJ), Esperanto Notĉias (RJ), Komunikoj (RJ), Antaŭen (SC), Tagiĝo (DF), Suda Stelo (RS), O Correo, de Ilheus (BA), Informilo Steloj (RS), O Roraima (RR), La Lampiro (SP), Correio Frateno (RJ), O Sol Nascente (RJ), Brazilia Katoliko (SP), Parana Informilo (PR), Gazeta de Barra Mansa (RJ), Momenton (SP), Boletim Informativo e Doutrinário do Grupo Espirita Francisco de Assis (RJ), Bahia Espirita (BA), Avante (MG), Pernambuco Esperantista (PE), Medicina Heroldo (MG), O Semeador (SP), Folha Espirita (SP), Bahia Este Mês (BA), Tribuna do Cacau (BA) kaj informilo Esperanto-Notĉias, eldonata de Majoro Gilberto Silva Velho (SP).

PLIGRANDIĜAS NIA ANARO

Aliĝis lastatempe al BKE jenaj samideanoj, al kiuj la estraro prezentas bonvenajn salutojn kaj sinceran dankon pro la filiigo:

D-ro Wilson Veadó (MG), Sérgio dos Santos Cunha (PA), Celso Martins (RJ) kaj André Koch Torres de Assis (SP).

Post tiuj aliĝoj, konsistigas la anaron de BKE 255 individuaj membroj plus 32 institucioj laŭleĝe organizitaj.

ĈU VI JAM SCIISTION?

1 La angla lingvo havas ĉ. 455.000 vortojn, la franca ĉ. 210.000, la rusa ankaŭ pli ol 200.000. Sed por la ĉiutaga babilado oni bezonas ne pli ol 500, por diskuti inter kleruloj ĝenerale sufiĉas 2.000, kaj kiu posedas 8.000 vortojn, povas plenumi la plej altajn pretendojn pri riĉeco de lingvaj esprimoj.

2 La Nova Testamento enhavas nur 4.800 diversajn vortojn, la Malnova Testamento 5.600, la verkoj de Milton 8-7.000, Iliado kaj Odiseo kune 9.000, la verkoj de Goethe 11.000. Sed nesuperebla restis ĝis nun Shakespeare, en kies verkoj troviĝas 24.000 diversaj vortoj.

3 Ekzistas ĝis nun pli ol 500 provoj, krei internacian lingvon. Inter ili nur Esperanto atingis atentindan disvastiĝon kaj praktikan uzadon. Sed tion vi sendube jam sciis (Ĉiuj informoj el la libro "Miru, Pensu kaj Ridu").

4 Al la 66a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Brazilo aliĝis 1750 personoj, kaj ne 1749, kiel malprave informas UEA en siaj jarlibroj, ekde 1982 (El la kongresa dokumentaro ĉe s-ano Cunha).



KONTRIBUAĴOJ POR LA BULTENO

Danke ni ricevis de la subaj samideanoj kontribuadojn kiel abonojn aŭ subtenajn donacojn:

Djalma Alves Ferreira	Cr\$	5.000
Edésio Eustáquio Avelar	Cr\$	3.000
Elizabeth de Souza	Cr\$	3.000
Evaristo José de Andrade	Cr\$	3.000
Marilu Rodrigues Lares	Cr\$	3.000
Telma Crhistina P. de Freitas	Cr\$	3.000
Zelia Maria	Cr\$	3.000
Willy Nascimento Sales	Cr\$	2.000
Luiz Mário Santos Silva	Cr\$	700
Dr. Wilson Veadó	Cr\$	40.000
Maria Júlia J. R. da Cunha	Cr\$	2.000
André Koch Torres de Assis	Cr\$	5.000
Sylla Chaves	Cr\$	10.000
Francisco S. Almada	Cr\$	100.000
Sumo	Cr\$	182.700

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

HONORA PREZIDANTO

Francisco de Souza Almada - Av. Bernardino de Campos, 624 ap. 72, BR 11100 - Santos - SP.

Estraro

Prezidanto: Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás, 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP.

Vic-prezidanto: Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15, BR 71500 - Brasília - DF

Sekretario: F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

Kulturaj Aferoj: Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

Informa Bulteno

Dumonata Oficiala Organo de la Asocio
Jarabono Cr\$ 4.000

Por aliaj landoj, US\$ 5.00

Asociaj membroj ricevas ĝin senpage

RESPONDECAJ DIREKTOROJ

Carlos A. S. Cunha (ĉefredaktoro), Nelson P. Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

BRAZILA ESPERANTO-ASOCIO

Rapidaj konsideroj prezentitaj de
s-ano Carlos Cunha dum la debatoj pri
la ĉeftemo de la 20-a Brazila
Kongreso de Esperanto

Sinjorinoj kaj sinjoroj! Karaj gekongresanoj!

Pri la kongresa temo (Integrigo en la Esperanto-Movado) mi parolos tre malmulte, ĉar mia opinio estas esence persona, kaj povas ne esprimi pro tio la sintenon de Brazila Konsilantaro de Esperanto, kiun mi prezidas.

Antaŭ ĉio, tamen, nepras ekzameni kio estas "integrigo".

La vortaroj instruas, ke la verbo "integrigi" signifas "eniĝi en la tutaĵon, tiel ke oni komplete fandiĝas en ĝin".

Do, per la propra vortara difino, integrigo estas kunfandiĝo ne nur de konkretaĵoj, sed de ideoj, de pensoj, de inicato, de agoj kaj de homaj fortoj, tiel ke de la kunigo de tiuj eroj rezultu potencialo kapabla venkigi ambician projekton sur kiu aj kampo, inkluzive de la Esperanto-movado.

Bela ekzemplo citenda tiurilate estas la kulpola integrigo de Brazila Esperanto-Ligo, kultura kooperativo de Esprantistoj kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto, de kies objektiva kunagado aperis la Nacia Esperanto-Komisiono — NEK, kiu patronas la okazigon de tiu ĉi 20-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj nuntempe, inter aliaj gravaj faroj, administras fonduson starigitan per financaj kontribuoj de la tri landaj E-organizaĵoj.

Estas ja konata mia persona revo pri estonta jura integrigo de BEL, KKE kaj BKE en ununuran fortan institucion, kiu plej alte reprezentus en Esperantujo nian landon kaj funkcius sub la siglo B.E.A., komencliteroj de BRAZILA ESPERANTO-ASOCIO.

Tamen, dum tiu ĉi revo ne okazas, pravas la Nacia Esperanto-Komisiono, ke tia jura kunfandiĝo, kvankam dezirinda, ne estas fundamenta por la integrigo de homoj pretaj kunlabori serioze por la bono de nia movado.

Por fini miajn personajn konsiderojn, mi memorigas la ĉeestantaron, ke sincero, senpartieco, abnegacio, persista agado, kuraĝo kaj aŭdaco estas la plej bonaj fermentoj por igi sukcesan nian revatan integrigon, kies ampleksan diskutadon celas la ĉefa temo de tiu ĉi brila 20-a Brazila Kongreso de Esperanto.



LASTE APERIS ESPERANTA ANTOLOGIO; POEMOJ 1887-1981

Ce Universala Esperanto-Asocio ĵus aperis la poezia kolekto "Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981". Ĝi estas la dua eldono de "Esperanta antologio", kiu en 1958 aperis sub la fama libromarko Stafeto.

Ĉi tiun novan eldonon komplete reviziis kaj renovigis William Auld, kiu redaktis ankaŭ la unuan eldonon. La nova verko — unu el la plej imponaj libroj iam aperintaj en Esperanto — tra entute 883 paĝoj donas laŭtempe aranĝitan superrigardon pri la plej valora originala poezio en la Internacia Lingvo ĝis 1981. William Auld elektis pli ol 850 poemojn de 163 poetoj, ofte el revuoj kaj volumoj ne plu haveblaj. Li mem verkis specialan postparolon pri la Esperanta poezia kulturo. La biografiaj notoj pri la poetoj kovras 36 paĝojn.

"Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981" estas la unua volumo en Jubilea Kolekto 'Jarkento de Esperanto'. La libro estas plumbe presita en Ĉinio kaj fortike bindita kun ora surpriso, kromkovrilo (desegnita de Franko Luin) kaj silka paĝindikilo. Formato 22 x 16cm. ISBN 92 9017 030 1. Prezo: 60,00 guldenoj, plus sendokostoj. Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj. Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (Eldona Fakdo de UEA/gs).

ĈU VI KONAS LA TERON?; CAPITROJ EL LA GEOLOGIAJ SCIENCOJ

Aperis la libro Ĉu vi konas la teron?; Kapitroj el la geologiaj sciencoj originale verkita en Esperanto de d-ro Endre Dudich, eldonita de Scienca Centro de UEA, Budapeŝto.

Ĉi tiu altnivela enkonduko en la geologion estas la plej grava kaj plej ampleksa antaŭenpaŝo sur la kampo de tiu scienco en la Internacia Lingvo. La aŭtoro traktas en populariga maniero tra 12 ĉapitroj la jenajn subbranĉojn de la geologio: geonomin, geokemion, mineralogion, dinamik-an geologion, petrologion kaj sedimentologion, paleontologion, tektonikon, ter-internon, ter-historion kaj stratigrafion, aplikajn geofizikajn kaj geologion, kosmogeologion kaj planedologion.

Ĉiun ĉapitron akompanas abundaj figuroj kaj tabeloj, kiuj vivigas kaj klarigas la tekston. Fine aperas geologia leksikono kaj listo de rekomendita Esperanta kaj alilingva literaturo. Antaŭparolon verkis ing. Petăr Todorov, estrano de UEA pri faka agado.

La verko ampleksas 150 paĝojn plus 68 paĝojn da scienc-teknikaj anoncoj kun la formato 230 x 165mm. ISBN 963 571 080 1.

La sola distribuanto estas la Libroservo de UEA.

Prezo: nur 12,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj). Eldona Fakdo de UEA recenzis.

COMISSÃO NACIONAL DO ESPERANTO

20º CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO

Acerto final de contas

RECEBIMENTOS

Adiantamento da NEK	100.000
Taxa para alojamento	76.000
Arrecadação para almoço	756.000
Leilão	353.500
Livraria	171.075
Venda de crachás	1.000
Adesões	2.288.500
Doações	184.865

3.930.940

PAGAMENTOS

Selos	96.449
Devolução	100.000
Impressos	502.800
Transportes	445.400
Gratificações	229.000
Telefonema	31.651
Despesas Diversas	237.040
500 sacolas	125.000
Placas p/ monumento	140.000
Pago restaurante	743.820
Doação (alojamento)	61.000
30% adesões p/ NEK	686.550
Lucro Líqºa distribuir	532.230

3.930.940

COMISSÃO ORGANIZADORA

a) Eurico Antonio Ribeiro
1º Tesoureiro

VISTO

a) Carlos A. S. da Cunha
Coordenador da CNE

STATISTIKO PRI LA 20-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

ĈEESTANTOJ EN LA INAŬGURO: 600

ALIGINTOJ: 446

- Viroj	240
- Virinoj	171
- Infanoj	13
- Asocioj	22

APARTENANTOJ AL SUBAJ ASOCIOJ: 489

- UEA	116
- BEL	117
- BKE	110
- KKE	84
- BEJO	62

ALIGINTOJ LAŬ STATOJ: 440

- São Paulo	151
- Rio de Janeiro	132
- Minas Gerais	60
- Bahia	30
- Distrito Federal	19
- Paraná	18
- Rio Grande do Sul	10
- Ceará	4
- Goiás	4

- Mato Grosso	3
- Pará	2
- Santa Catarina	2
- AM, ES, PE, RN, SE po unu	(5)

EKSTERLANDANOJ ALIGINTAJ:	6
SAMTEPAJ ANOJ DE UEA/BEL/	
KKE/BKE:	27
SAMTEPAJ ANOJ DE BEL/BKE:	51
SAMTEPAJ ANOJ DE BEL/KKE:	45
SAMTEPAJ ANOJ DE KKE/BKE:	36

LIBROSERVO-
VENDOREZULTO: Cr\$ 2.582.010

- APE	931.000
- BEL	647.200
- KKE	482.400
- AMARILIO	308.500
- RAMATIS	41.800
- Diversaj	171.110

KONGRESA BILANCO
(ACTIVO-PASIVO): Cr\$ 7.861.880

- Enspezoj	3.930.940
- Elspezoj	3.398.710
- Neta profito	532.230

(NEK-Kunordiganto kompilis)



BRAZILAJ NOVAĴOJ

FEDERACIA DISTRIKTO

△ Nia estraro fiksas por 1985 jenajn tarifojn: Jara aliĝkoto, Cr\$ 12.000 (individua membro kiu anticipas la pagon ĝis 31-12-84, rajtas rabaton de Cr\$ 2.000); Unujara abono de la Bulteno, Cr\$ 4.000 (El eksterlando, US\$ 5.00). Por mondonacoj, kompreneble, ne ekzistas tariftabelo. Kiel tradicie, vi kontribuos laŭ via kapablo kaj bonrovo.

△ D-ro Paulo Vieira da Silva, PHD-profesoro kaj rektoro de la kongresa universitato okaze de la 66-a UK en Brazilja, estos la estrarano pri kulturaj aferoj en la nova direktorado de BKE por la oficperiodo 1985/87.

△ En la San-Komisiono de Deputita Câmbro, la Stomatologia Sekcio de Universala Medicina Esperanto-Asocio faris en 17/10/84 oficialan lanĉon de nacia prevent-kampanjo, omaĝe al la Centjariĝo de Brazilia Stomatologio. Nia prezidanto dankas pro la ĝentila invitilo sendita de D-ro Roberto V. Resende, ĝenerala kunordiganto de la evento.

MINAS GERAIS

△ En la unua semajno de decembro, en la publika biblioteko de Divinópolis, okazos granda E-ekspozicio kiun zorge preparas s-ano Paulo R. Santos. Se vi posedas afiŝojn, faldfoliojn kaj kiun ajn materialon ekspoziciindan, bonvole kontaktu s-ron Paulo (Av. 7 de Setembro, 170, CEP 35500-Divinópolis).

△ Laŭ pertelefona komuniko de s-ano Carlos Augusto Guedes al la kunordiganto de NEK, la Organiza Komitato por la 21-a Brazilia Kongreso de Esperanto okazonta en Belo Horizonte havas jenajn ĉefajn membrojn: Prezidanto — Carlos Augusto Guedes; vicprezidanto — Marcus Tulio A. Flores; 1-a sek — Ana Lúcia Crespo; 2-a sek — Alberto Luiz Minardi Chueire; 1-a kasisto — Dalmo Soares Arantes; 2-a kasisto — Onézimo da Costa e Farias. Kongresperiodo: 17/21 julio 1985. Adreso de Organiza Komitato: Rua Guajaras 410, s/807, fone 201-7819, BR 30000-B. Horizonte.

PARAÍBA

△ S-ano Antonio Maria kaj aliaj intelektuloj, kadre de la "II Seminário sobre a Micro-Região dos Cariris Velhos — Problemas e Perspectivas", okazinta en la urbo Monteiro (CEP 58500), inter la 12-a kaj 14-a de oktobro, tie fondis la Academia de Cultura "Princesa do Cariri". En la oportuno, s-ano Antonio Maria sin proponis distribui materialon pri Esperanto kaj propagandi la Lingvon kun seriozeco.

PARANÁ

△ Baldaŭ aperos "Fundamenta Gramatiko de Esperanto", verkita de la akademiano kaj prof-ro Geraldo Mattos. Konsiderata kiel unu el la plej profundaj kaj revoluciaj studoj pri la lingvo internacia, certe la gramatiko altiros la atenton de ĉiuj studentuloj. Rezervojn/mendojn oni jam povas fari ĉe Paraná Esperanto-Asocio, Rua Dr. Muricy 542, sala 1201, BR 80000 - Curitiba.

RIO GRANDE DO SUL

△ Esperantista Societo de Porto Alegre okazigas ĉiun duan sabaton de ĉiu monato kulturan arangon nomitan "Viva Revuo". Temas pri prelegoj faritaj lertaj esperantistoj, speciale invitataj por tiu celo. En la inaŭgura revuo (08-08-84) prelegis d-ro Ivo Sanguinetti, kiu alportis el la 20-a Brazilia Kongreso de Esperanto vido-kasedan kolekton de intervjuoj kaj debatoj.

△ Nia delegito en Caf, s-ro George O. Vaske, ekde la 5-a de septembro instruas Esperanton en la Universitato UNISINOS, al deko da profesoroj kaj altlernejoj. Temas pri daŭriga kurso gvidita de pastro Pedro Beltrão, kiu devis reiri al Romo.

△ Por 1985, la Esperantista Societo de Pelotas (Caixa Postal 554, CEP 96100) estos administrata de jena direktoraro: Prezidanto — Paulo Domingos Caruso; vicprezidanto — Evandes Barbosa; sekretarioj — Cezarina Maria Caruso k. Mário Antonio Siri; Kasistoj — Pedro O. Sorondo k. José Leonel Pinto; bibliotekistoj — Mário Noguez k. André Luis M. Caruso; internaj aferoj — Eduardo Iorio Pereira; konsilantoj — Francisco Carlos Moraes, Leda Christina Medeiros k. Eva Regina Azevedo. Felican kaj fruktodonan oficperiodon ni deziras al ĉiuj.

△ Dank' al persista laboro de la supraj estraranoj, la loka gazeto "Diário Popular" ekaperigas ĉiudimanĉe Esperantan kolumnon, malnovan revon de la esperantistaro de Pelotas. Por tio multe kunlaboris la ĵurnalisto, s-ro Newton Peter (Rua 15 de Novembro 718, BR 96100), kiu meritas ricevi gratulkartojn aŭ telegramojn pro la rimarkinda evento.

RORAIMA

△ Jus fondiĝis en Boa Vista (Rua Tenente Guimarães 723, Bairro da Liberdade, CEP 96300 - Boa Vista) la Infana Esperanto-Grupo, kies unuaj estraranoj estas: s-ro Elias Rodrigues de Andrade — prez.; s-ro Braulio F. Nunes — sek.; s-ro Hozana da Silva Viana — Kasisto; fraŭlo Marcelo de Andrade Silva — bibliotekisto; fraŭlo Rinaldo de Andrade Santos — sportoj; kaj s-ro Josué de Souza Lima kaj fraŭlino Micherla de Andrade Silva — gekunlaborantoj. La Grupo celas lernigi Esperanton al infanoj de la urbo kaj ilin motivi por la praktikado de sportoj. Ekde nun estas je dispono de la Grupo la paĝoj de tiu ĉi Bulteno por diskonigi la agadon de la estraro. Felican al ĉiuj!

RIO DE JANEIRO

△ "Esperanto: Plezuro plus Kulturo" esta baptonomo de ambicia projekto, kiu celas enkonduki E-on en la kulturan fakon de ĉiu Asso-

ciação Atlética Banco do Brasil, en la tuta lando. Respondeas pri la projekto s-ano Ruy C. Albuquerque, altranga oficisto ĉe CACEX de Banco de Brazilo en Rio, helpata de la emerita kolego D-ro Jorge Soares das Neves, veterano esperantisto, advokato, verkisto kaj poeto premiita en pluraj landoj. En la sidejo de AABR-Rio (Av. Borges de Medeiros 829, Leblon) okazis la 26an de oktobro prelego kaj debatoj, kiam s-anoj Ruy kaj Jorge atentigis la ĉeestantaton pri kurso realigota tie, inter la 16-a de novembro ĝis la 20-a de decembro 1984.

△ Per rimedoj el sia Fonduso Zamenhof, la Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz pretendas tuj komenci la konstruadon de sia propra sidejo.

SANTA CATARINA

△ "Stilo similas al nazo" estas la titolo de bonega artikolo verkita de d-ro Walter Boppé kaj aperinta en la numero 6 (septembro/84) de Antaŭen, oficiala organo de Esperantista Asocio de Santa Catarina. Nepre legu ĝin, ni sugestas.

△ Surbaze de la bone organizitaj preparlaboroj, oni esperas, ke la 3-a Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto, kiun patronas la Statestra Moŝto D-ro Espiridião Amin kaj promocias Esperantista Asocio de Santa Catarina kun la helpo de esperantaj organizaĵoj el Rio Grande do Sul kaj Paraná, estu grandioza, profidona kulture kaj finance, kaj prezentu rekordan aliĝnombron kompare kun la renkontiĝoj de Porto Alegre kaj Curitiba.

SÃO PAULO

△ Nova esperantista asocio aktivas en São José do Rio Preto, sub la prezidanteco de Solange G. dos Reis. Ĝi nomiĝas "Clube de Esperanto de S.J.R.Preto", kun oficejo en: Praça Cacilda Becker s/nº (Casa da Cultura), CEP 15100 - São José do Rio Preto.

△ Dio finfine aŭdis niajn preĝojn. Pliboniĝas pli kaj pli la sanstato de nia kara Prof. F.S. Almada, kiu jam rekomencas en Santos sian poresperantan apostoladon. Al li kaj lia admirinda edzino Maria Almada ni estas tre dankaj pro la malvara donaco de 100 mil kruzeiroj.

PARADIZO SUR LA TERO

*Sen konflikto, mizero kaj malsano
la Paradizo povas esti nun
tie ĉi sur la tero, nepre kun
la solv' de ĉio laŭ la dia plano.*

*Nia mondo fariĝos la plej bona
ekde kiam malsano malaperos
ekde kiam la homoj ne suferos
pro sia vivo plena, fruktodona.*

*Sekve ni venkos la mizeron.
Ĝi naskiĝas de malsano kaj eraroj,
de la malbonaj agoj kaj misfaroj,
kiuj nepre formortos tie ĉi.*

*Sen la malsano kaj mizero, ĉio
prosperos sen konflikto (ho, surprizo!)
ĉar malaperos la tutmonda krizo
kaj ne feliĉo estos utopio...*

JORGE DAS NEVES

ĈU VI KAPABLAS RIDI?



(Decaj anekdotoj el la libro "Kruko kaj Baniko el Bervalo", de Louis Beaucaire)

Espero katolika

Du kanonikoj babilas:
— Ĉu vi kredas, ke ni spertos antaŭ nia morto la edziĝorajton de la katolikaj pastroj?
— Certe ne ni, sed niaj infanoj.

Ni dankas la venton

Instruisto poezie klarigas al la lernantoj la misteron de la reproduktado:
— Kiel la vento portas la semon de planto al planto kaj fekundigas ilin, tiel naskiĝas la infanoj.

Juna klasano rimarkigas:

— En dormoĉambro ne blovas vento.

La perfekta edzino

De multaj jaroj fraŭlo atendas idealan edzinon. Al siaj amikoj li ĉiam asertas, ke taŭga virino devas havi tri kvalitojn:

Ŝi estu — ŝparema en la kuirejo
— aristokrata en la salono
— malĉasta en la dormoĉambro

Iam la amikoj ekscias, ke li edziĝis. Renkontante lin, ili tuj demandas lin, ĉu lia edzino vere posedas la tri postulatajn kvalitojn. Kun malgaja mieno li respondas:

— Jes, sed ne ĝustaloke. Ŝi estas aristokrata en la kuirejo, malĉasta en la salono kaj ŝparema en la dormoĉambro.

La mistero de l'sango

— Kara amikino, via bebo estas la vera portreto de sia patro.
— Espereble mia edzo neniam rimarkos tion.

Gaja lernolibro

Maljuna tedulo, provante delogi knabinon, premas ŝin kaj flustras:

— Mi legas en vi kvazaŭ en libro.

Ŝi rebatas:

— En libro brajle skribita.

KONTRIBUU LAŬ VIA IMAGPOVO

J. Pauluk

Kion fari por disvastigi Esperanton ne nur en nia urbo sed ankaŭ en tiuj lokoj kie estas neniu esperantisto?

Mi pensis kaj decidis sendi esperantan gramatikon al personoj kiuj povus sin interesi pro la afero. En katolika revuo mi trovis adresojn de pastroj kiuj zorgas pri junuloj kaj mi sendis al ili ekzempleron de Primeiro Manual de Esperanto.

Jen surprizite, el Lages (SC) mi ricevis poŝtkarton kiun multe ĝoigis min. En ĝi estas skribite, en portugala lingvo: "Kara s-ro Pauluk. Pacon kaj feliĉon! Mi dankas vin pro la riĉa esperanta gramatiko kiun vi sendis al mi. Mi ja necesis tian libron por bli bone koni la movadon favore al Esperanto. La komunikado inter la popoloj estas tre grava por la dialogado. Dankon pro ĉio. P-o Enzo."

Kiel oni vidas, ekzistas multaj personoj al kiuj Esperanto povas interesi sed kiuj neniam aŭdis ion; aŭdis sed ne scias kiel kaj kie trovi necesajn librojn, aŭ pli grave, aŭdis misinformojn de tiuj kiuj kritikis ĝin. Al tiuj interesitaj personoj mankas nia helpo.